

esperantoUSA

1992(3)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

Making News This Issue

Cyberanto?

Esperanto was created to make international communications easier—in a word without radio or telephone. Today we have both of these—and now the computer network. What happens when Esperanto goes online?

See Page 2

Edwin Grobe

This relatively new Esperantist has made a name for himself, both nationally and internationally, as one of the motors of the movement in Arizona, publisher of at least three newsletters, and a regular contributor to *Monato*.

See Page 9


LaserJets and Networks

John Dale shows those of you with HP Laserjets and Word Perfect 5.1 how to produce neat printed matter in Esperanto; and David Wolff introduces you to the esoterica of computer networks.

See Page 13

The University of California in Berkeley—site of the 40th annual ELNA Conference, 18-23 July. Above and to the right is the Campanile, the city's best known landmark, easily seen from the Conference center. If you have not yet signed up, take the time to do so right now! You can get a sign-up form by calling the ELNA C.O.'s information number—(800) 828-5944—and leaving your name and address and asking for the “congress sign-up form.”

ELNA Congress '92



EDITORIAL

ON THE NET

When I was younger, science fiction consisted largely of ultra-powerful spacecraft built in the back yards of elderly (but not necessarily mad) scientists and manned, if that is the correct word, by athletic young heroes and incredibly pulchritudinous young ladies whose abundant charms were not usually concealed by a minimum of clothing. Well, times have changed. Science fiction has branched out into a maze of sub-genres, many of which have nothing to do with spacecraft, scientists, heroes or ladies—in fact, Judith Merrill's insistence that the S in SF means "speculative" and not "science" is probably much more true today than it was twenty-five years ago when she advanced the idea.

Since the advent of the TRS-80, the Commodore PET and the Apple II personal computers a decade and a half ago, a new sub-genre of SF has appeared: so-called "cyberpunk." I have read very little in this particular field, but as far as I can tell it relates largely to a future, or sheaf of futures, in which networked computers are the primary feature of the milieu, and in which human society is determined by interaction with and through these computer networks.

Robert Heinlein once wrote that technology is easy to predict: it is the way it affects society that is difficult to forecast. Anybody, Heinlein said, could have predicted the automobile. What they could not have foreseen was traffic jams, suburbia, and the effect of drive-in movies on the national birth rate.

Similarly, I suspect that the human societies, often dark and depressing, of the cyberpunk works are largely shots in the dark. But the technology ... ah, the technology. That is easy to predict. And for a simple reason. Much of it is already here.

Three and a half years ago I started subscribing to CompuServe. CompuServe is an electronic marketplace, operating out of Ohio, which claims a million or so subscribers. CompuServe has an electronic-mail system and a number of different "forums"—electronic meeting rooms—including one for foreign languages that includes a special Esperanto sub-forum. I dropped out in late 1990,

because my computer was moved away from the telephone connection, but recently, at the urging of Jonathan Pool, I "hooked up" again and, again with some advice from Jonathan and help from an article by John Starling in *Novjorka Prismo*, widened my electronic horizons to include two "lists" on another network, Internet. CompuServe subscribers, it turns out, can exchange E-mail with persons on the worldwide Internet, as well as several other networks.

What's the use of E-mail? Well, the most obvious advantage is that you can send a message, or a complete letter, over the network and get an answer back from Australia or Germany (I am not speaking here of theoretical cases, but of actual experiences!) in a matter of hours. Basically, you use a word-processor (*tekstoprilaborilo*) to create a letter on your computer, then dial up your local E-mail drop (the phone number I use is in Berkeley, some eleven miles from my house) and upload the letter to the mail facility; when you check back in a few hours you should, depending on the diligence of the person at the other end, have a reply.

This speed of reply also has consequences in the teaching of Esperanto. Think for a moment about the basic ten-lesson correspondence course that some ELNA members have been teaching so successfully for the better part of a decade. You send in your lesson ... the postal service takes three days to deliver it ... the diligent instructor, assuming that he or she is at home and immediately available and not swamped with other work, takes a day to correct it and get a new lesson into the mail ... the postal service takes another three days to deliver it—and at best you have a week between lessons. But Esperanto is the sort of language that can be learned *fast*! On the computer, you do your lesson and send it to your tutor ... at 186,272 miles per second it reaches his mailbox in at most 1/15 of a second ... that evening he checks his mail, finds your lesson, corrects it in his computer, uploads the corrected version ... back to your mailbox in 1/15 of a second ... and in the morning you have it

and are ready to go ahead with the next lesson.

Again, I'm not talking here about *theory*; in a year of existence the Free Esperanto Course (described by Derk Ederveen in *esperanto*, Nov. 1991) and its French equivalent the Cours Gratuit d'Esperanto have had a total of 340 students, of whom 41 have received their diplomas. (Let me take this opportunity to recognize those North Americans helping to correct the courses: Steven Brewer, Neal McBurnett, Charles Galvin, Ronald Harvey, Leszek Kordylewski, Csaba Lendvay, Jon Liechty, Bruce Sherwood and Kevin Walsh from the U.S., and Paul Hopkins and Cleve Lendon from Canada.)

Or suppose you want information about something. Any of you younger Esperantists thinking of going to the Internacia Junulara Kongreso in Montréal this year? Want to write a letter asking for information and entrust it to the postal service? Expect an answer in about two weeks. Or ... drop an electronic line to Sylvain Auclair of Montréal at r5220@uqam.bitnet, and get an answer back *tuj*. Want to get immediate comments about your writing ability in Esperanto? Upload something you've written and wait for responses; John Starling is doing this, and it's a good, cheap way to improve your linguistic abilities. Want to find out how to say "pre-processor" in Esperanto? Check Pierre Jelenc's on-line list of computer terms. Want to know when some particular Esperanto conference in Switzerland is going to be happening? Edmund Grimley-Evans in Germany makes a list of such conferences available.

What *can't* you do with E-mail? Well, you can't (yet!) drop a line through the net to either UEA or ELNA ... but that's sure to happen, sometime down the road; already, according to Ionel Onet at the C.O., some 10% of ELNA's members have E-mail addresses as well as ordinary postal addresses and telephone numbers.

Take my advice—dig out that old computer and your 1200-baud modem, hook it up to your telephone, and get started.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

The Providence, RI, *Sunday Journal* (Sep. 8, 1991) carried a United Feature Syndicate puzzle by Don Rubin in which readers were invited to match up 40 Esperanto words in one column with their English counterparts in an adjoining column. (provided by Nicholas R. Palumbo and Ronald H. Provost)

An article in the New York, N.Y., *Times* (Dec. 24, 1991), reporting on the increasing popularity in the U.S. of Tintin comics from Europe, mentions that it has also been published in Esperanto. (sent by David R. Brown; San Francisco *Chronicle* condensation sent by Maya Kennedy)

An article "Judaica Philately" by Dr. Murray Frost in *Global Stamp News* (Dec., 1991) speaks of Esperanto postage stamps and includes illustrations of the Cuban Esperanto stamp and a first-day cover with picture of Zamenhof and the Yugoslavian stamp of 1988. (reported by Conrad Fisher and Cornelius J. McKown)

A software firm that does computer programs in Esperanto for distribution in Eastern Europe might seem like a money-making idea to those of us who know something about the distribution of Esperanto speakers; but Joe Queenan, in an article "Other People's Money" in *SPY Magazine* (Dec. 1991), simply uses the idea as a ploy for demonstrating that people will buy into any capital-absorbing plan, no matter how ridiculous it may seem... (provided by Ellen Eddy)

Ah, logic! In an article in the Washington, DC, *Post* (Jan. 1, 1992), about changing country names, Henry Allen, quoting E. James Lieberman, mentions that "in Abidjan, the capital of Cote d'Ivoire ... speakers ... of Esperanto ... call their own country Eburia Bordo ..." and in the next paragraph, after mentioning the alternate names Eburbordo and Eburio, talks about "... confusion in a language that no one speaks ...". Hey, Henry, how can you talk about speakers of a language that no one speaks? (sent by Jim Lieberman)

On Monday, Jan. 6, 1992, at the end of

the TV show "Northern Exposure," the protagonist, Fleishman, the doctor of Cecily, Alaska, asks in regard to some allegedly talking trees: "Well, what do they speak? English? Esperanto? What?" (reported by Steve Belant)

Jim Specht of Gannett News Service, in an article about Congressional support for initialization of the metric system in the Poughkeepsie, PA, *Journal* (Jan. 24, 1992), writes: "The metric system? Didn't that go out with ... Esperanto, the so-called international language of the future?" Uh ... right, Jim. (sent by Lynn Bartlett)

Your editor has now had a chance to review an episode of the British TV science-fiction series *Red Dwarf* in which one of the main characters is studying a televised Esperanto course (KTEH, Jan. 26, 1992). Viewers of this program can learn such important Esperanto phrases, correctly translated and more or less properly pronounced, as *Bonvolu sendi por la portisto, estas rano en mia bideo* (Please send for the doorman, there's a frog in my bideo). Those who watch the program regularly will recognize that Esperanto is a running feature. The series is independently purchased by public TV stations around the country. (also reported by Ed Willinger)

Madeline Davidson, starting an article on food irradiation in the Fresno, CA, *Bee* (Jan. 29, 1992), asks: "Where was Esperanto when we needed it? The once-touted international language never caught on, but I'll bet we could have learned it faster than the international symbols that pop up everywhere." How true, how true... (from the ELNA C.O.)

Mathematics Notes from Washington State University (Jan. 1992) consists of an article "Hungary for Mathematics," in which Julie Kerr describes her mathematics studies at Eötvös Lorand University in Budapest and tells how useful Esperanto was for her in her daily life in Budapest. This four-page newsletter also gives ELNA's address for those interested. (sent by Arlyn Kerr)

The *MENSA Bulletin* (Jan./Feb. 1992) has published a letter by Leah S. Goldberg describing Esperanto in glowing terms and giving the address of the Central Office and the office's toll-free telephone number. (sent by Leah Goldberg)

"Esperanto stays on tip of tongues" says Victor Patton, Staff Writer for the Pasadena, CA, *Star-News* (Feb. 23, 1992). In an article about the Esperanto Association of Los Angeles which concentrates on the age of most members of the organization, Patton quotes Association treasurer Edna Stein as saying: "One person out of every 1,000" might show some interest in Esperanto, but when someone begins to learn it, "he's stuck on it forever." (provided by Stuart Mosher)

Despite the title—"6th-graders tackle universally obscure language—Esperanto"—an article by Neil Steinberg in the Chicago, IL, *Sun Times* (Feb. 26, 1992) is quite favorable. The article discusses the teaching of Esperanto at three Chicago elementary schools and quotes not only Tony Gravagno, President of the Esperanto Society of Chicago, but also Ronald Kimbrough, president of the Louisa May Alcott School council: "We were overwhelmed by [Esperanto's] benefits. It is something the students can carry on through life." (provided by the ELNA C.O.)

The March issue of *G'raffiti*, published by the Camelopard Society in San Diego, contains a full-page introduction to Esperanto based on the first two lessons of the free ten-lesson correspondence course. The article, written by "Johano Kavaliro," also contains ELNA's address and telephone number. (provided by Cathy Schulze)

When the editor found his favorite science-fiction author Poul Anderson explaining in his latest book, *The Time Patrol* (Tor Books, 1991) that artificial languages generally are weak when it comes to human things ("An Esperantist who hits his thumb with a hammer will not likely yell, 'Excremento! [sic]'), all he could think to say was a despairing "Fek'!" (provided by Mike Donohoo)

The Writer's Craft: Idea To Expression by Sheridan Blau, Peter Elbow and Don Killgallon contains a one-page description of Esperanto. (sent by William C. Dickerman)



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

ALASKA

La 19an de marto George Partlow prelegis pri Esperanto al gimnazia klaso pri la angla lingvo por naturdotitaj kaj talentaj geinfanoj, laŭ la invito de la kursanoj. Li preparolis la uzeblecon de la IL, emfazante precipe la UEA-jarlibron, la Pasportan Servon de TEJO, la gazetaron (*Monato*, *El Popola Ĉinio*, *La Espero de Koreio*, ktp), kaj la kreskantan uzon de Esp-o ĉe la internaciaj elektronikaj komunikretoj. La aŭdantaro multe interesiĝis pri la afero kaj estis multaj demandoj. Ili invitis lin reveni je la 20a kaj instrui mallongan enkondukan lecionon, celante kolektivan verkon de mallonga poemo. Ĉiu partoprenanto ricevis la unuan lecionon de la perkoresponda kurso de ELNA. Espereble tiuj gejunuloj formos kernon de vigla junulara E-grupo en la politika ĉefurbo de Alasko, Juneau (ĝuno). **Esperanto-Societo de Alasko, P.O. Box 240557, Douglas, AK 99824, tel. (907) 364-3309**

ARIZONA

Donacinterŝanĝe, samideano Anatolo Sidorov, indianisto loĝanta en rusa urbo Syktyvkar, lastatempe alvenigis al *Arizona Stelo* ekzempleron de furore laŭdata kaj multkvante aĉetata libro *La danĝera lingvo*, studo verkita de germana esperantisto Ulrich Lins pri persekutoj okazintaj diverslande kontraŭ Esperanto. La redaktoro de la revuo aldonis la libron al la Pearl-Wegher-Esperanto-Biblioteko. (laŭ *Arizona Stelo*, marto 1992)

Sabaton la 22an de februaro, inter la 1a kaj la 3a horoj ptm., okazis ĉe Arizona-Centro en centra Fenikso la tria Esperanto-konversacihoro por samideanoj de la Sal-Rivera Valo. Tiu estis la tria tia kunsido de la 1991-1992a agadsezono. Partoprenis dek esperantistoj: Madeleine D'Estries, Edveno Grobe, Elisabeth Hicken, Nita Jones, Jay Kamchi, Mary Lindeman, Attila Magyar, Bill O'Ryan, Thane Read kaj Anĝelina Taremi. (laŭ *Arizona Stelo*, marto 1992) Esperanto

Society of Arizona, 1620 North Sunset Drive, Tempe AZ 85281

CALIFORNIA

La 15an de decembro proks. 20 geesperantistoj festis la naskiĝdaton de L. L. Zamenhof en la hejmo de Don Coleman, Sekretario de la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj. Dum la kunveno, pluraj anoj rakontis pri festosezonaj kutimoj en diversaj landoj kaj etnoj. Oni ankaŭ kolektis 27 kilogramojn da vestaĵoj por sendi al la Unuiĝintoj por Ĉernobilo en Ŝostka, Ukrainio. **Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, P.O. Box 324, Berkeley CA 94701**

Kvardek-unu geesperantistoj el Norda Kalifornio, Hispanio, kaj Rusio partoprenis festenon kaj bankedon omaĝe al L. L. Zamenhof en la restoracio Louvre en Montclair dimanĉon la 12an de januaro. La festparoladon faris Mike Donohoo, Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA. Postbankeda aŭkcio gvidata de William Harmon enspezigis 227 dolarojn por la SFŜU Fonduso kaj ankaŭ sumon por la Agado E3 kontraŭ blindeco en la Tria mondo. **San Francisco Esperanto Regional Organization, 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010, (415) 342-1796**

Inter la 10a kaj la 12a de aprilo 32 esperantistoj partoprenis la Tut-Kalifornian Esperanto-Konferencon ĉe la Ŝtata Departemento de Klerigado en Sacramento. La ĉefparoladanto estis d-ro David K. Jordan de la Universitato Kalifornia ĉe San Diego, kies nova libro, *Being Colloquial in Esperanto*, aperos ĉe University Press of America fine de majo. Oni diskutis plurajn aferojn, i.a. kiel finance profiti pere de Esperanto.

Nova komencgrada kurso en Sacramento estas granda sukceso, kun entute 13 partoprenantoj. La lecionoj okazas en la kunvenejo de la Unitarana-Universalisma Societo. Por instrui, oni uzas materialojn el *Esperanto • Learning and Using the International Language* de David B. Richardson. Instruantoj estas

Steve Schwichow kaj Steve Belant. **Esperanto Society of Sacramento, P.O. Box 60860, Sacramento CA 95860, tel. (916) 485-3116**

CONNECTICUT

Jam en marto la Esperanto-Societo de Suda Nov-Anglio ricevis 50 kartojn kaj leterojn el 19 diversaj landoj cele al letervespero. (el la marta bulteno de la klubo) **Southern New England Esperanto Society, 446 South Quaker Lane, West Hartford CT 06110**

DISTRICT OF COLUMBIA

La Esperanto-Societo de Vaŝingtono bankedis ĉe la Georgetown Holiday Inn okaze de la Zamenhofa festo. Ilin regaligis Jim Lieberman per interesa prelego pri siaj dumvivaj spertoj kun Esperanto; Ralph Dumain per deklamado de kelkaj poemoj; kaj Elizabeth Duckett per lerta kantado de muzikigita versio de la fama poemo "Jerusalemo" de William Blake, esperantigita de William Auld. Ankaŭ bedaŭrinde regaligis ilin, per bombasto, bruo kaj biero, grego da adeptoj de la New York Giants, kiuj estis invadintaj la apudan ĉambRon kaj laŭte distrompetis siajn futbalajn herezaĵojn. (La postan frazon la redaktoro ne bone komprenis...) (el *La Potomaka Esperantisto*, februaro 1992)

Kelkaj vaŝintonregionaj esperantistoj ensonorigis 1992-jaron per kantfesteneto ĉe la hejmo de Allahina Russell la 18an de januaro. Oni kantis kelkajn muzikaĵojn, kaj usonajn kaj internaciajn, tradukitajn de eksocietano Sergio Docal, kaj ankaŭ aliajn. Allahina diris, ke ŝi intencas okazigi similajn aferojn estontece. (el *La Potomaka Esperantisto*, februaro 1992) **Esperanto Society of Washington, 5840 Cameron Run Terrace #714, Alexandria VA 22303, tel. (703) 960-3303**

ILLINOIS

En Chicago, la urbestro, Richard M.

Daŭrigo sur paĝo 12



EL LA CENTRA OFICEJO

ĈU LA ANGLA AŬ ESPERANTO? (2)

En mia lasta artikolo mi klarigis, kial la angla verŝajne ne estos la vera internacia lingvo. Sed ĉu tio signifas ke Esperanto venkos? Zamenhof respondis jese en sia fama *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia*, kiu ankoraŭ estas la plej bona ekspliko, kial Esperanto nepre devos fariĝi la internacia lingvo. Zamenhof argumentis ke registaroj aŭ popoloj eble unue elektos alian lingvon kiel la internacian sed tio ne sukcesos, kaj fine oni devos turni sin al Esperanto.

Sed se ni rajtas esti optimismaj, ni devas ankaŭ konfesi ke estos tre malfacile atingi tian sukceson. La angla estas la plej influhava lingvo en la mondo, kaj nun Esperanto ne povas konkurenci kun ĝi. Por homo kiu deziras studi la anglan, pro mongajnaj aŭ aliaj kialoj, lernolibroj kaj klasoj kvazaŭ falas en la manojn. Ankaŭ estas ĉiutagaj elsendoj radiaj kaj televidaj, filmoj, multe da denaskaj parolantoj, ktp. Mi ne devas diri ke la situacio estas tute alia por la Esperanto-lernanto.

Sed anstataŭ malesperi, ni povas decidi kiel plej efike plifortigi la Esperantomovadon kaj tiam kunlabori por atingi la celojn. Fakte la temo de la venonta kongreso de ELNA estas ĝuste tio: "Kunlabori Efike." Ni povas kunlabori ne nur kiel individuoj kaj kluboj sed ankaŭ kun alilandaj esperantistoj kaj organizoj. Ĉi-sube estas kelkaj sugestoj

kaj ideoj pri tio kiuj venas plejparte de membroj de ELNA. Se vi havas komentojn aŭ aliajn ideojn kunportu ilin al la Kongreso, aŭ sendu ilin al mi aŭ la redaktoro de *Esperanto U.S.A.*

Eĉ se estas malpli da rimedoj por lerni Esperanton, eŭropa esperantisto havas avantaĝojn super usona esperantisto ĉar la eŭropano povas aniĝi al klubo kiu eble havas plurcent homojn, aŭskulti ĉiutagajn radiajn elsendojn, ktp. Tio ne eblas en Usono kiu situas sur la periferio de Esperantujo. Esperanto-elsendoj, kiuj plejparte estas direktitaj al Eŭropo kaj Azio, ne estas kapteblaj en Usono, kun la escepto de 15-minutaj elsendoj de Svisa Radio Internacia. Membro de ELNA skribis al mi ke tio estas grava ĝeno por li, ĉar li loĝas tre malproksime de aliaj ELNA-anoj kaj tial ne nur ne konas aliajn esperantistojn sed ankaŭ ne povas aŭdi la parolatan lingvon. Kion fari? Unu ebleco estas organizi kampanjon kaj sendi leterojn al unu el la elsend-stacioj, petante ke oni direktu elsendojn al Nordameriko. Ni povus fari tion kunlabore kun la kanada kaj meksika Esperanto-organizoj.

Alia letterskribinto menciis ke "jam temp' está" por televida kurso en Esperanto. Tia kurso estis tre sukcesa en Ĉinio, kaj estas homoj en Eŭropo kiuj preparas alian. Usonaj esperantistoj povus kunlabori kun ili. La membroj de

AATE (*American Association of Teachers of Esperanto*) certe volonte kunlaborus, sed ni bezonus ankaŭ spertulojn pri televido kaj mecenatojn.

Fakte kunlaboro kun alilandaj esperantistoj certe povus helpi la usonan movadon. Se iuj usonaj esperantistoj sentas sin izolitaj de la usona movado, ankaŭ la usona movado estas izolita de la cetero de Esperantujo. Ni certe povus lerni de alilandaj esperantistoj, kaj kunlaboro helpus la tutan movadon.

Fine, sendube la plej grava malfacilaĵo kiun la usona movado ĉiam alfrontas estas la preskaŭ tuta nescio pri Esperanto ĉe usonanoj. Nur malmultaj eĉ scias ke Esperanto ekzistas, kaj tiuj kiuj iam iel aŭdis la vorton ĉiam ripetas la samajn kliŝojn—ke Esperanto ne estas vera lingvo, ke ĝi formortis, ke ne eblas paroli ĝin, ktp. Kiam artikoloj pri Esperanto aperas, ELNA ĉiam ricevas multe da informpetoj, kaj multaj el la informpetintoj eklernas Esperanton. Do usonanoj, kiuj laŭdire ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn, volonte lernas Esperanton—se oni informas ilin ke ĝi ekzistas kaj estas vivanta lingvo uzata tra la tuta mondo. Se vi havas novan ideon por informi pri Esperanto, sendu ĝin al ELNA, aŭ kunportu ĝin al la Kongreso kun viaj aliaj ideoj. Antaŭdankon!

—Mike Donohoo
Dirketoro, ELNA C. O.

Daŭrigo de paĝo 6

La 79-a Kongreso de japanaj esperantistoj okazos la 29an ĝis 30a de aŭgusto en la Hotelo Taikansoo en Matusima apud la urbo Sendai. Matusima estas ĉemara turismejo kun pitoreskaj insuloj kaj historiĥavaj temploj. La kongresa hotelo situas sur monteto, kaj posedas plenan perspektivon super marbordo kaj insuloj. Por kostoj kaj kondiĉoj: **Organiza Komitato, 79-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, 980-91 SENDAI, P.O. Kesto 120, Japanio.**


Tutecaj estroj el multaj landoj kaj

institucioj partoprenos la konferencon **Co-Planet '92** en Granada, Hispanio, inter la 22a kaj la 26a de julio, 1992. Esperanto estos unu el la tri oficialaj lingvoj (kun la hispana kaj la angla). Interesitoj pri tiu ekologiema konferenco povos ricevi detalojn de: **Co-Planet 92, Recogidas 46. 1a planta, oficina 14, GRANADA 18005, Hispanio, telefono (34 958) 259962, telefakso (34 958) 259911.**

La Oficejo de Daŭra Klerigado de la Universitato de Suda Illinois ĉe Edwardsville provizos unusemajnan kurson de Esperanto por komencantoj ĉe 1819 W. Pershing Road en Chicago, inter la 22a kaj la 26a de junio, 1992. Informoj pri kreditoj, kostoj ktp. estas haveblaj de: R.

Kent Jones, 5048 N. Marine Dr #D-6, Chicago IL 60640, tel. (1 312) 751 3259 aŭ (1 312) 271 8673.

La 11a NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) okazos de vendredo, la 25a de septembro, ĝis dimanĉo, la 27a, ĉe Fort Worden State Park en Port Townsend, Washington—ĉarma, marborda urbeto. La loĝejoj por la konferenco estas iamaj domoj por arme-oficiroj, kaj ankaŭ estis loko por la filmo "An Officer and a Gentleman". Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj. Por informoj kaj aliĝiloj petu al: **Bob Simmonds, 190 East Beach Rd., Nordland WA 98358, tel. (206) 385-2110.**



ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivajn plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Korespondemuloj! Kolektantoj! Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo en *Korespondi aŭ Kolekti*. Por ricevi prov-ekzempleron sendu 3 IRK aŭ US\$2 al la el-donanto: **R. Melo, 34 Avenue de Russie, F-03900 BELLERIVE sur Allier, Francio.**

La venonta kunveno de la Esperanto-Societo Kebekia okazos la 13an kaj 14an de junio de 1992, en Sainte-Catherine-de-Hatley, samloke kiel pasintan jaron. Ni esperu, ke la vetero estos bela! Pli da informoj oni povas ricevi de: Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A rue de Bordeaux, MONTRÉAL Québec, Kanado H2G 2R8.

La revuo *Language Problems & Language Planning* de la Centro por Esploro kaj Dokumentado de Mondaj Lingvo-Problemoj estas en 1992 havebla kontraŭ \$35.00 pageblaj senpere al John Benjamins Publishing Company, 821 Bethlehem Pike, PHILADELPHIA PA 19118, Usono, telefono 1-215-836-1200, telefakso 1-215-836-1204.

La milito inter Serbio kaj Kroatio preskaŭ entute detruis la havaĵojn de la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj ("mono en banko konfiskita kaj poste bankoj bruligitaj, arkivo, biblioteko, varbmateriale kaj alie neuzeblaj"). Kiuj volas montri humanecon, solidarecon kaj helpopretecon, tiuj povas sendi mondonacojn al: Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, Skolska u. 25, YU-56227 BOROVO, Jugoslavio.

Haveblas en Esperanto du dokumentoj de la Unuiĝintaj Nacioj: **Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj**, kaj **Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo** (la du lastaj en unu dokumento). Se vi deziras ricevi la Deklaracion, bonvolu sendi malgrandan blankan adresitan koverton kun poŝtmarko \$0.29 (por alilandanoj, 1 Internacia Respondekuponon) al: **Universala Esperanto-Asocio, 777 UN Plaza Suite 1, NEW YORK NY 10017, Usono.** Se vi deziras ambaŭ dokumentojn, sendu koverton 22,5 x 15 cm. kaj \$0.52 da poŝtmarkoj aŭ 2 IRK.

Fervojoj estas en la tuta mondo. **IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)**, la plej vasta esperantista faka organizo, aliĝinta al UEA, intencas pligrandigi sian anonon en ĉiuj landoj; ĉefe kie ankoraŭ ne estas kunordigitaj aŭ izolitaj membroj-fervojistoj. Ni varme invitas interesitojn kontakti la Sekretarion: **d-ro Romano BOLOGNESI, Via Misa 4, I-40139 BOLOGNA, Italio.**

Al la blindaj esperantistoj en Usono: Se vi ŝatus helpi starigi usonan filion de **LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj)** bonvolu skribi vian nomon kaj adreson al **Roan Orloff Stone, Rt. 1, Box 46C, Hallsville TX 75650.**

Oni invitas esperantistojn, antaŭ la **Universala Kongreso en Vieno**, partopreni la **25an Internacian Renkonton Naturamikan, 13-24an de julio 1992, en Abaliget, Hungario.** Abaliget situas en suda Hungario, okcidenta parto de la montaro Mecsek. Malgranda kampadejo sur bela arbara montodeklivo kun 3-personaj somerdometoj kaj du hoteletoj atendas la gastojn. Limdato de aliĝo estas la 10a de junio 1992. Por informoj: **Departementa Komitato de Hungaria Esperanto-Asocio, Esperanto—IREN—Pf:2, H-7601 PECS, Hungario.**

Napóra Zegar Sloneczny eldonata (pliparte en la angla) fare de la **East European Documentation Centre on Naturism and Related Subjects** havas konstantan Esperantlingvan rubrikon. EEDCN bonvenigas leterojn kaj konvenajn artikoletojn en Esperanto. EEDCN, P.O. Box 3379, GR-10210 ATHINAI, Grekio.

La Vroclava Filio de la Pola Esperanto-Asocio elkore invitas al la **28-a Internacia Esperantista Feriado** en la kuracloko **Kudowa Zdrój** sur la suda deklivo de la Sudety-montaro, inter la 4a kaj 15a de aŭgusto 1992. Programo enhavas: kursojn, seminariojn, kulturalan kaj distran programon, video-filmojn, diskdancadojn, maskobalon, ĝojfajron, montarajn piedajn kaj aŭtoĉarajn ekskursojn, ankaŭ al Prago. Por informoj kaj aliĝilo: **Pola Esperanto-Asocio, 50-952 WROCLAW 17, ul. Dubois 3 skr. poczt. 16, Pollando, tel. (48 71) 22 69 54.**

Adventistoj vivas pli longe ol aliaj personoj. Kial? Ekkonu la sekretojn pri ili pere de senpaga Biblia kurso, al kiu mi invitas Vin. Post fino de la kurso Vi ricevos donace Biblion en Esperanto. Poste mi

intencas eldoni kurson pri sana vivo. Bonvolu skribi al: **Kjell Peder Hoff, Bjørkenes, N-1970 HEMNES I HØLAND, Norvegio.**

Post dujara paŭzo reaperas la korespondamika bulteno *Friends' Addresses—Adresa druzej—Amikaj Adresoj* en la rusa, angla kaj Esperanto, en okpaĝa ĉiumonata formato. Kosto estas \$10.00 jare. Oni povas aboni ĉe: **Amikaj Adresoj, ab/ja 2420, 660075 KRASNOJARSK, Rusio.**

En Estonio, la **Universaal-Kooperativ Aitai** intencas eldoni en 50 000 ekzempleroj, sendotaj al 130 landoj, **grandformatan internacian komercan gazeton *La Komercesto*** en Esperanto. Oni nun serĉas abonantojn, kunlaborantojn (kiuj ricevos 15%-an maklerajon), kaj reklamantojn. La kooperativo ankaŭ traktas importadon-eksportadon de diversaj varoj. Por informoj, abonoj (12 britaj pundoj por unu jaro / 12 numeroj), ktp. kontaktu: **Universaal-Kooperativ Aitai, 203600 PÄRNU, pk. 100, Estonio, tel. (7 01444) 44 788 aŭ 67 758, telefakso (7 01444) 40 739.**

Esperantista kooperativo Interhelpo en Prago aranĝas ĉambrojn por tiuj, kiuj volas viziti la urbon post la UK en Vieno. Unu ĉambro (du litoj, matenmanĝo, propra tualetoj kaj duŝejo) kostas 44 DM. Oni proponas vizitojn al teatro **Laterna Magica**, burgo **Karlštejn**, subteraj kavernoj kaj katakomboj kun gustumado de ĉeĥa vino, ktp. Post la 10a de junio oni devos malmendi la neuzotajn ĉambrojn. Por informoj: **Interhelpo, p. kesto 44, 150 00 PRAHA 5, Ĉeĥoslovakio, telefono kaj telefakso (42 2) 542 993.**

Esperantistoj en la riviera urbo Nico nun kolektas monon por konstrui **Esperanto-Domon**. Aĉetintoj de kuponoj (po 100 francaj frankoj) rajtos poste uzi ĉiun aĉetitan kuponon por ununokta loĝado en la Domo. Por informoj kaj mendilo: **NICE-ESPERANTO, Les Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 NICE, Francio, telefono (33 93) 83 08 73.**

El Hungario nun aperas dusemajna kaj (provizore) okpaĝa mezformata gazeto pri aktualaĵoj en Esperantujo. Ĝi estas eldonata de **SZILVÁSI László** de **Lingvo-Studio**. Jarabono kostas 49 nederlandaj guldenoj (pli-malpli \$26), plus 7 gld por aerpoŝta sendo; abonon oni povas pagi pere de konto **ELLS-S** ĉe **Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando.** Por informoj: **Lingvo-Studio, H-1675 BUDAPEST, Pf. 87, Hungario.**

by David Wolff

[David Wolff, *Estrarano de ELNA kaj estro de la Eldona Komitato, lastatempe aranĝis la reeldonon de Step By Step in Esperanto de Montague C. Butler. Jen li priskribas la aperon de Esperanto • Learning and Using the International Language de David Richardson, la unua verko, kiu aperis sub la egido de ELNA.*]

I never expected to be in charge of a \$20,000 project for ELNA. I had come to the 1980 national convention because, as a fairly new member of the Board of Directors, I felt some responsibility to be involved: to meet my fellow directors, find out how things were running, gather the latest gossip, and offer my two cents worth now and then. Afterwards, I planned to return home and spend a pleasantly busy Centennial helping the New England group grow.

Then, within the budget discussions (which, by the way, are regrettably but unavoidably dull), *The Esperanto Book* came up. This is a book that would cover everything than an American interested in Esperanto would need to get started: history, lessons, examples, dictionary. Dave Richardson had already written it. All we needed was an estimated eighteen thousand dollars for the typesetting and printing costs.

It was clear that ELNA had no such money floating around. In fact, ELNA was still rejoicing that it had more or less broken even, after significant losses in

previous years. But, in a moment of unguarded enthusiasm, I suggested that the money could be raised. I volunteered to speak to the members of the convention and ask for money, to show the other Directors that you have to ask for money to get it. This is important: that's *all* that I volunteered to do.

The twenty or so people who were there no doubt remember it. I explained the situation: how useful the book would be, how it would go into libraries and advertise for us, how classes would use it. And how it would take \$25,000 (I added a little for inflation, and because I preferred having too much money to running out.) Then I threw in \$10 of "mia mono... mia propra mono... mia kara mono!" Then I demanded that every executive committee member there add some more. ("La estroj devas estri." Of course, I probably should have warned them beforehand that I was going to do this. Oh well.) Then I asked everyone else for a contribution. And in fifteen minutes we had raised \$357, or about two percent of the total needed.

Well, I was satisfied that I had done my duty and shown the Board how to squeeze an audience for money. My punishment came the next day. ELNA asked me to coordinate the entire project. If I had suspected that this would occur, I might never have made my little speech. Who needs *more* work? But this was for

ELNA... it would not happen at all otherwise... the Centennial was coming up... so I neglected my local group to coordinate the Book Project.

With the help of many people, we succeeded! The donations and pre-orders came flowing in in response to my letter. (One memorable day, I came home from work to find checks totaling \$1,000 in my mail.) And so we were able to typeset and print the book (now famous as *Esperanto: Learning and Using the International Language*, or more briefly as "The Richardson book." We printed a hard cover, professional looking book, one that looks great in libraries and indeed is still advertising Esperanto for us. We sent complimentary copies to everyone who donated \$50 or more, and you can still see the names of those who donated \$500 or more in the front section.

We missed our 1987 goal by a few months, but the book has done very well nonetheless. We sold out the first printing of three thousand copies in less than two years and have printed another three thousand copies. And part of the profits from "The Richardson Book" now go into the Book Fund, so we will be able to reprint it again when necessary and also support future projects.

And that's how the Richardson book happened, except, of course, I still had to write up a final report on the project... write thank-you letters...

PRI KURSOJ KAJ ALIAJ KURSAĴOJ

de Ionel Onet

Kia agrabla sento konstati, ke la nombro de E-kursoj kaj kursanoj kreskas (inkluzive en Usono)! Kiel plaĉe estas konstati, ke niaj E-instruistoj laboras! Kia malpeziĝo pensa, certi, ke la estonteco de la Esperanta movado senĉese prepariĝas! Kaj kia amara gusto legi anoncojn pri E-kursoj, en kiuj abundas eraroj, pro kiuj nur komencanto rajtus esti pardonita!

Jen, el tia anonco, mi eksciis, ke la kurso estas *junulara*, dum aliloke oni

klarigas (pri la sama kurso), ke *ĝin paroprenas multaj gejunuloj, sed ne nur*. Sendube, la klarigo devas esti *junuloza* (riĉa, abunda je gejunuloj), dum *junulara* signifus, precipe, "por gejunuloj". La kurso ne estas oficiala, kaj ĝin instruas neprofesia *instruanto* kaj ne *instruisto*, kiel menciite. Laŭ alia anonco okazos, ie en Esperantio, *progresiva* E-kurso. Sendube, kurso kapablas (ivas) progresi, sed en tiu ĉi kazo, supozeble temas pri *progresiga* kurso (kurso kiu igos la

studentojn progresi en Esperanto).

Jes ja, la *studentoj*, kaj ne la *studentoj*, kiel menciite en alia neuniversitata E-kurso. *Studento*, ĉar temas pri persono kiu studas, kaj ne nepre pri *universitata studento* = *studento*. Oni uzas en la ĉi tiea angla lingvo unu solan vorton por montri ĉiuspecan studenton—*student*. En Esperanto, kiu jen montriĝas fojfoje pli riĉa ol la "naturaj" lingvoj, la parolanto povas esti pli preciza: *kolegiano* = *studento en kolegio*, *liceano* = *studento en liceo*,

gimnaziano = *studanto en gimnazio*, *lernejo* = *lernanto en (ĝenerala) lernejo*. Uzante vortojn, kiel *lernejo* aŭ *lernanto*, oni ne montras malrespekton, sed precizecon, kiel indas por lingvo internacia.

Nu, tiu studento aŭ lernanto povas esti *komencanto* aŭ *progresanto*, kaj ne *progresinto* (= iu, kiu progresis) ĉar tiu ĉi jam estas iaspeca "spertulo". Kaj precipe, li aŭ ŝi ne povas esti *avancita* (eraro akceptebla nur en la *Bulteno de la Akademio de Esperanto*). Ĉar *avanci* estas netransitiva verbo, *avancito* havas nenian sencon (almenaŭ por mi). *Avancinto* jes ja havas: iu, kiu avancis.

Tiu studento (komencanto, progresanto, avancinto) estas ankaŭ *klasano* = ano de (Esperanta) klaso. *Havi klasojn*,

kiel mi aŭdis tre ofte, havas (por mi) duban signifon, precipe se vi estas *klasano*. Eble vi havas kurso(j)n, kvankam mi dirus, ke vi ĉeestas aŭ partoprenas kurso(j)n aŭ lecionon (kiel parto de klaso). *Klaso* estas grupo de studentoj, kiuj studas en *klasejo* (la ĉambro).

Ne malpli ofte mi aŭdas pri kursoj, kiuj *komencas* kaj/aŭ *finas*. Kaj tiam mi pretas malbeni tiujn dulingvajn vortarojn, kiuj ne mencias la transitivecon de la verboj en Esperanto, kaj mallaŭdi tiujn, kiuj ne atente studas kaj enkapigas ilin (la verbojn, kompreneble). Kaj *komenci* kaj *fini* estas transitivaj verboj: la instruisto *komencas* la lecionon aŭ *finas* ĝin, dum la leciono *komenciĝas* kaj *finiĝas*. Alifoje, mi aŭdis pri kurso kiu

daŭriĝas aŭ *ĉesiĝas*. Anstataŭ komenti, mi nur mencias, ke *daŭri* kaj *ĉesi* estas ambaŭ netransitivaj.

Alifoje, mi *informiĝis* (kaj ne *lernis*), ke en E-kurso uziĝas libro, kiun *skribis* certa aŭtoro. Eble, en certaj etapoj de la verkado, la aŭtoro skribis la koncernen libron aŭ partojn de ĝi, aŭ eble li aŭ ŝi entajpis ĝin. Ni ne povas certi (precipe en la lastaj jaroj, kiam la *komputiloj*, *komputoroj*, *komputeroj*, *komputroj*, *komputatoroj* iĝis parto de nia ĉiutaga vivo). Sed pli certe estas, ke la aŭtoro *verkis* la libron (= kreis ĝin).

Supozeble, per la supraj linioj ankaŭ mi kreis sufiĉe da ... kapdoloro. Mi do haltu ĉi tie, alie *la studentoj ne lerniĝos nenion el kio la instruisto lernis al ili en la klaso, kiu komencis la 7a kaj finis la 9a*.

LANGUAGE IN THE NEWS

[*Ah, ces hommes français, ils sont obstinés!*]

[France's UN Ambassador Jean-Bernard Merimée] ... stressed that the new Secretary-General [of the United Nations] "has to speak French." Further underscoring that point, he said, "No doubt about it, because that is final. We take the view that the Secretary-General has to be able to express himself in the two languages which are the official languages of the Secretariat, English and French...

"I must emphasize that it is not only the position of the French government; it is the position of all the French-speaking delegations because they suffer a handicap if they are in relation with a Secretary-General who doesn't speak French."

He described Javier Perez de Cuellar as "particularly fluent" in French, as well as English.

[Merimée] is married to a former New Zealander who moved to Paris as a child when her father worked for Unesco. Mme. Merimée, a French citizen, speaks English with a slight French accent, and insists that she and the ambassador "never, ever speak English together."

[From the Diplomatic World Bulletin, Vol. 22 No. 11; sent by Rochelle Grossman.]

[Please are reading follows with special care!]

Every car, videocassette recorder,

boom box or stereo imported into the U.S. from Japan has operating and assembly instruction. ... In almost every instance, the translations have been done in Japan—a fact often obvious upon reading them.

"This can for be attached only when operating..." or equally poor "Japlish" translations are all too common. There are simply not enough good English speakers in Japan.

Why aren't the Japanese sending more of their translations to the U.S. [for translating]? For one thing, Japanese who study English in Japan actually believe they speak good English. Traveling in Japan, one sometimes sees people wearing big buttons that say "I speak English"—but when you talk to them they do not understand a word you say. There are not enough foreigners around to contest the translators' presumed English proficiency, so the directors of Japanese translation departments think their translations are good.

[From an article by John Freivalds in The Wall Street Journal, Sep. 25, 1991; sent by John Massey.]

[*"Über alles in der EC..."*]

Groping for a greater role in the world, Germany has asked the European Community to raise the status of the German language in its official deliberations. Chancellor Helmut Kohl wants the EC to put German on a par with English and French in the 12-nation organization's documents and meetings, a government

spokesman said yesterday.

A Kohl spokesman told the Associated Press that German is a second-class language in many EC affairs. "We have always had a problem that English and French have been first when it comes to [publication of] EC documents," the official said. "Naturally, we want German to be appropriately acknowledged."

Unification made German the most widely spoken language in the EC countries, and the end of Soviet domination over Eastern Europe has dramatically revived long-dormant German cultural and linguistic connections in countries that once had been under German control. Germany's Goethe Institute has been quick to open branches throughout the former Eastern bloc, and German business people are an omnipresent sight in Eastern European capitals.

At the EC, and in other international forums, German diplomats say they are making a point of delivering speeches and papers in German rather than in English. "We have the size and the importance now to work in our own language," said a German diplomat who is fluent in English, French and Russian. "That doesn't make us aggressive. That's normal."

[Condensed from an article in the San Francisco Chronicle, Jan. 3, 1992; pointed out by Mike Donohoo.]

Daŭrigo sur paĝo 12

Kiam, kie kaj kial vi lernis Esperanton?

Dum mia 40-jara kariero kiel universitat-profesoro pri la franca, mi ofte aŭdis pri Esperanto. Kiam mi emeritiĝis en 1989, kiel libertempa flankinteresiĝo, mi komencis lerni Esperanton en kurso okazigata ĉe Arizona Ŝtat-Universitato, sub aŭspicioj de A.S.U.-Esperanto-Klubo. Miaj vere bonegaj geinstruistoj, Anĝelina Taremi kaj Bill O’Ryan, tre interesiĝis pri mia progreso, kaj ili invitis min vespermanĝi ĉe ili unufojon ĉiusemajne por plirapidigi min. Mi baldaŭ multe aktiviĝis en arizona Esperantujo, dank’ al ilia konstanta prizorgado pri mi.

Altiŝis min ne nur la eksteraj lingvaj aspektoj de Esperanto, kies senliman esprimkapablon mi baldaŭ malkovris kaj tuj admiregis, sed ankaŭ la ena homama filozofio subtenanta la lingvon, ĉar mi estas aktiva unitariano, kaj mi rapide rimarkis mirindajn similecojn inter la zamenhofs kaj la unitariano deziroj kunigi ĉiujn surterajn rasojn, religiojn kaj kulturojn en sintezon de reciproka interkompreniĝo kaj tolereco.

Kiu estas la kampo, en kiu vi plej laboras por Esperanto, kian laboron vi faras en tiu kampo, kaj kial vi opinias tiun kampon aparte grava?

Pro tio, ke mi instruis la francan literaturon dum tiom da jaroj, kun speciala atento al beletraj stiloj de ties diversaj movadoj, aldone al la fakto, ke mi estas poeto, pianisto kaj komponisto, kiam mi esperantistiĝis, mi preskaŭ tuj interesiĝis pri la literatura povo kiun mi sentis kuŝantan ene de Esperanto kaj mi ege ekdeziris verkadi originalajn tekstojn en la lingvo por pli profunde esploradi pri tiu povo. Samtempe mi spertis fortegan deziron apogi la klopodojn de miaj karaj geinstruistoj celantajn pligrandigi kaj plivalorigi Esperanto-movadon en Arizono. Do, mi kunigis miajn literaturajn interesiĝojn kaj miajn dezirojn helpadi la enŝtatan movadon per starigo de novajbulteno *Arizona Stelo*, kiu aperas ĉiunonate krom juni-julie, kaj kiu havas, laŭ la universitatsezono, inter 100 kaj 200 gelegantojn.

Ĉi-momente *Arizona Stelo* atingis sian 13an numeron. Al kelkaj spertaj esperantistoj malplaĉas la dulingva

(Esperanta kaj angla), paralelkolumna formato de la bulteno, sed ili forgesas tion, ke multaj el niaj gelegantoj estas universitataj studentoj farantaj nur baznivelan kurson pri Esperanto kiuj pro tio, laŭ sia propra afirmo, profitas ege la dulingvan formaton por pligrandigi sian esperantlingvan vortprovizon, por pliprofundigi sian komprenon pri gramatikaj formuloj kaj por certigi al si, propraokule, la fakton, ke Esperanto estas aŭtentika ĉiurajta lingvo, ege kapabla fari la samegan informlaboron, ĉiudetale, ĉiunuan, kiun faras la angla.

Gajninte iom da memfido pro la relativa sukceso de *Arizona Stelo*, mi komencis serĉi novan agad-arenon kiu ebligus min barakti kontraŭ problemoj kiu ĝenis min preskaŭ ekde mia unua esperantistiĝmonato: la ĝenerala, laŭ mi, malestimo kiun multaj eŭropaj geesperantistoj sentigas rilate al usonaj geesperantistoj. Kiam mi baldaŭ abonis *Esperanto* kaj *Monato*, ekzemple, mi tuj rimarkis, ke plejparto de ties artikoloj estas verkitaj de eŭropanoj, ke usonaj okazintaĵoj maloftege raportigas sur iliaj paĝoj, kaj ke kiam, de tempo al tempo, eŭropaj verkistoj konsentas nomi Usonon, ili faras tion plejofte per akratona malaproba voĉo kiu, ŝajnas al mi, malbonege taŭgas al movadanoj devantaj kredi al tutplanedaj homaraj egaleco kaj interkompreniĝo. Plue, mi rimarkis, ke plej ofte tiaj malamaj sintenoj ŝajnas baziĝi sur manko de aŭtentika rekta persona konado pri Usono.

Tiumomente, mi elektis ekstarigi duan arizonan bultenon, ĉi-foje kulturan, temantan pri la neesperanta vivo de mia hejmnŝtato, kaj celantan precipe eksterlandan gelegantaron por ke almenaŭ iuj alilandanoj akiru pli ĝustan scion pri usona kulturo. Kaj naskiĝis *Arizona Suno*, kvaronjara kulturbulteno kiu parolas, nur esperantlingve, pri tiaj ekstermovadaj temoj: indianoj, hispanusonanoj, vakeroj, brutbienaferoj, dezertoj, kanjonoj, kakttoj, irigacikanaloj, aerolitaj krateroj, indiĝenaj civilizacioj, antaŭhistoriaj, postkolombaj esploradoj en Nov-Hispanujo, fantomurboj, arkeologiaj muzeoj, ekologiaj problemoj, ktp.—unuvoite, pri ĉio, kio apartigas arizonan kulturon disde tiu de ĉiu alia usona ŝtato. Tiumomente, *Arizona Suno* havas pli ol 100

gelegantojn en pli ol 20 landoj sur kvin kontinentoj.

Plej lastatempe, laŭ peto de E.G.I. (Esperanto-Grupo Intermontara), mi starigis trian periodaĵon—provizoran—kvaronjaran *Intermontara Eŝo*, kies unua numero raportis pri 1991-a E.G.I.-Konferenco okazinta en Flavaŝtono-Parko. Kaj mi eĉ kuraĝas pripensi la eblecon starigi kvaran bultenon temantan pri gramatikaj problemoj, bultenon por gelernantoj ne havantaj sufiĉe da mono por aĉeti tradiciajn presitajn lernolibrojn. Tiam bultenon oni povus precipe valorigi en malriĉaj landoj kie Esperanto-movado malsaniĝas pro manko da lernolibroj. Sed la propono restas tiumomente ne certa.

Kiu, laŭ vi, estas la plej granda problemoj, kiun la Esperanto-movado en Usono nun frontas?


Esperanto neniam rapide kreskos en Usono antaŭ kiam ĝi sukcesos plenbrake kaj plentempe akceptigi sin en nacian universitatan lingvokursaron. La ĉefa lokaro de altnivela fremdlingvo-instruado en Usono restas la universitatreto, kaj la plej granda malforto de usona Esperanto-movado, laŭ mi, enestas ĝian malpovon enigi sin kiel daŭran egalrajtan kunlaboranton de klasikaj kaj naciaj lingvoj, en tiun sistemon. Tiun malpovon kaŭzas pluraj ne facile forigeblaj tradicioj de usona altnivela edukad sistemo.

1. Universitatnivelaĵ geprofesoroj devas posedi doktoran diplomon pri sia fakspecialiĝo antaŭ ol ricevi permeson instrui tiun specialiĝon. Doktoraj diplomoj pri Esperanto nepre nehaveblaj estas en Usono, kaj nur maloftege haveblaj eksterusone.

2. Doktoraj diplomoj atingebblas nur en universitatoj provizantaj postbakalaŭran kursaron al postbakalaŭraj kandidatoj. Sed, sen havebleco de antaŭa bakalaŭra diplomo pri Esperanto, ne povas ekzisti postbakalaŭraj kursaroj. En Usono bakalaŭrnivelaĵ studentoj ne povas akiri eĉ unuan, plej bazan diplomon pri Esperanto, ĉar ne ekzistas bakalaŭronivela specialiĝo pri Esperanto.

3. Ne ekzistas en usonaj universitatoj bakalaŭronivelaĵ kursaroj pri Esperanto-

Daŭrigo sur paĝo 11



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

[The following letter was provided to us as an abstract under the bylines of E.G. Mardon, A.A. Mardon, J.S. Williams.]

Scientists from such countries as Mongolia, Russia, Algeria, China, Germany and the United States are becoming more nationalistic. To inform communications between spacecraft of different nations and ground tracking stations on Earth, it would be a possible scenario for every individual connected with future voyages into space to have a working knowledge of Esperanto. English and Russian are now the leading languages in the scientific field. However, as more countries develop operational capabilities in space to the level of independent manned launch capabilities and operation from such countries as China, Japan, and Korea—Esperanto could be the vital “lingua franca”. This would mean that astronauts/cosmonauts would only have to learn one additional language—Esperanto—rather than the plethora of potential languages. Esperanto is based on elements of the chief European languages. Being an “artificial” language it is a structurally simple language and can be learned easily.

Scenarios where easy clear and coherent cooperation might be of an imperative nature are, for example, a “space rescue” scenario in which a Russian or American space craft was assisting a counterpart in distress.

The Apollo-Soyuz linkup had a component of linguistic compatibility where the two crews learned each others’ languages. Many non-English-speaking nations could potentially resist the “de facto” use of English as the operational language in space. The language that might be required for emergency situations and international operations could

amount to only a 1,000 word vocabulary.
Austin Mardon

Aldone al informo de Conrad Fisher (EUSA 1991(7), p. 11), laŭ mia scio alia persono ankaŭ ricevis dumvivan membrecon sen monpago. ELNA estas Delavara korporacio kaj devas havi konstantan poŝtan adreson en Delavaro. Benn E. Clouser, listigita en la unua ELNA-Adresaro (1975) kiel individua ELNA membro en Wilmington, konsentis ke la ŝtato de Delavaro rajtas uzi sian adreson por oficialaj ELNA aferoj. Por oficialigi la aferon, ELNA donacis al li dumvivan membrecon, kaj li estas tiel listigita dum almenaŭ la lastaj dek du jaroj.

William H. Schulze

[Laŭ mia kompreno, la unua senpaga dumviva membreco estis donacita antaŭ preskaŭ 40 jaroj al s-ro Jos. Leahy, kiu per siaj klopodoj kaj mono preskaŭ unusole vivtenis la organizitan usonan Esperanto-movadon tra la jaroj de la tutmonda ekonomia katastrofo 1930-1940.]

Kiam mi legis “El la Centra Oficejo” en *Esperanto U.S.A.* 1991(6), mi volis respondi. Mi tute konsentas kun la artikolo. Plejparte Esperanto vere estas pli facila ol aliaj lingvoj. Lernolibroj abundas, sed eĉ se ĝi estus la plej facila lingvo en la mondo, krom se oni povus aŭdi ĝin ofte, ĝi estus senutila. Kun aliaj lingvoj oni povas trovi facile iun kiu parolas la lingvon aŭ povas kapti dissendojn ofte en la lingvo.

Por mi la problemo estas reala. Mi loĝas en kampara parto de Usono kie ne estas kluboj, klasoj, instruistoj, aŭ eĉ multaj parolantoj de la lingvo. La sola okazo kiun ni havas aŭdi Esperanton estas per la mallongonda radio. Ĉi tiuj dissendoj nur daŭras kelkajn minutojn kaj ofte velkas kiam ni povas ricevi ilin entute.

Ni vere bezonas radiostacion kiu dissendas laŭte kaj klare pli ol kelkajn minutojn tage.

Mi kredas ke la celo de mia familio fari Esperanton nia dua lingvo dependas de la solvo de tiu ĉi problemo. Sen la solvo, nia sukceso ŝajnas senespera!

Johnny Curry

[En via regiono, vi supozeble povas aŭdi Radion Havana Kubo, sed mi ne certas pri la nuntempaj horoj. Ĉu vi pripensis la eblecon utiligi la servojn aŭ de la ELNA Aŭdvida Servo (informojn de la C.O.) aŭ la Magnetofona Servo de la Universala Esperanto-Asocio (p/a Rudiger Eichholz, R.R. 1, Bailieboro ON, Kanado KOL 1B0)?]

[La jenan leteron mi ricevis ne per la ordinara poŝto, sed per la komputila reto Compuserve.]

Hieraŭ mi ricevis la novan numeron de e/usa ktp. Temas pri la plej bona numero ĝisnuna! Mi ĉiam ĝuas la pripensindajn komentojn de Derek Roff, k simile tiujn de Pool. En la leteroj plaĉas al mi la sugesto de Kathryn Woods pri “matro”.

Ĉu vere la usona konstitucia dokumento ne troveblas en E-traduko?

Mi tute samopinas kun Ron Glossop pri la bezono de taŭgaj artikoloj pri E-o por *Weekly Reader* k.s. Mi mem, krom la artikolo por *Whole Earth Review* kiun vi jam legis, ankaŭ nun pritraktas ion por *Reader’s Digest* sed mi tute ne kredas ke mi estas la plej bona verkisto tiucele en la usona samideanaro. Kiel instigi la aliajn al tiu afero? Ĉu eblas konkurso en ELNA por la plej taŭga anglalingva artikolo pri E-o aŭ pri la movado? Ni tre bezonas la ekvilibron inter deeksterismo k deenismo kiun priskribas O’Ryan en sia artikolo...

Mi rimarkis la uzon far Rob Hardy de “vortprocezilo”; mi preferus “tekstoprilaborilo” (do “TPL”, “topolo” k.s.?). Kaj tio kondukas min al sugesto (aŭ almenaŭ demando): Ĉu vi aperigos la etan (k retan!) prikomputilan vortaron de Grimley-Evans en e/usa? Mi vetus ke ekzistas multaj pluaj homoj kiuj interesiĝas pri tiu subkampoj de terminologio, krom tiuj kiuj troviĝas ĉe la reto...

George W. Partlow

[Ankaŭ por mi “tekstoprilaborilo” estas pli bona termino, nete Esperanta, kaj facile komprenebla.]

[I didn’t intend to publish any more letters about sexism in Esperanto, but...]

It was several years ago that I first learned of the concept of Esperanto and during those intervening years I would spend the occasional evening searching through musty libraries in the hope that I would find more information.

It was only recently on my first return to the states in seven years that I chanced upon a book by David Richardson that lightened my heart. For the first time I had obtained the information I needed and with joy I flung myself into the learning of Esperanto and its culture.

I am not the most brilliant of students and there are aspects and nuances of the language which slip through my knotted fingers yet there was no specific concern of mine towards the language. I found it beautifully put together and surely one of the most eloquent languages on the face of this earth.

Then my ire rose. I found myself reading about a conflict that should not be. Yes, I too am writing concerning the lack of a male suffix, or should I say the problem of the female suffix.

Acck! Horrors! I feel giddy to my bones. Esperanto has a female suffix and no male suffix. I swoon to the ground quickly swearing I shall never promote this language to anybody I know (or not know as the case might be). How could I? Knowing that I promote a sexist language. Lying there looking up at the ceiling my resolution is fixed. I shall never promote any language that is so inherently sexist. Like Esperanto, or French, and if I think about it, English is inherently sexist too. I have it. I take my vow of silence.

Nope, don't even try. I'll not speak again. Nope, never again. Well, maybe a few words. I have to order a pizza anyway. I think I should consider this very carefully.

The problem with sexism is, it's there only when you look for it. As I quickly dodge a few ripe fruit, I'd like to point out that it's an individual's viewpoint that creates sexism. Okay, so *viro* means man and *virino* means woman. Personally I don't look at it and say "Gee whiz, of course that's right since women are only horrible mutations of the perfect creature known as man." I see it as a quantifier that expresses that there's more here than the root word of man. There's more, not an abstraction of man but more than what man is. See, that didn't sound that bad.

Of course we could use (as per Kathryn Woods' letter) different words for what is usually considered a female-oriented position. The example suggested was to use *matro* instead of *patrino* (personally I rather like the sound of *matro* and the concept she was suggesting—however) so we could also include such concepts as

virmatro, which is a male mother, and *patrino* would represent a female in a father role. Don't forget, we could also add the word *sato* for sister and we can have female brothers and male sisters just in case you're not sure what your siblings are.

Oops, that probably upset some minority somewhere—sorry.

One thing you seemed to miss is that the words Ms. Woods suggested are sexist. To have a word like *virmatro* which literally means a male mother is to suggest that the root word *matro* is a female-oriented role and that we must differentiate it when a male wishes to fill that role. Not implying that a male can't fill that role, only that it is usually a role filled by a woman. In other words, you're stereotyping, you sexist, you. Now I know somebody somewhere is yelling that this is what's happening in Esperanto when you go from *patro* to *patrino*. No it's not. Trust me.

All right, I'll explain. When you add the -in- to *patro* you're not implying that a woman is filling the father's role, you're implying a female version of a father otherwise known as a mother. Do you get it?

All I'm trying to say in my roundabout way is that although a descriptive suffix for a male is generally needed in the language, it should be applied to non-role words. Sexism is always going to exist if you look for it, especially if you try to tie gender specifics into identities or roles. If you want to change social sexism, you're gonna have to change the way people think, not the language they speak.

Esperanto is an amazingly well constructed language and the last thing we should try to do is complicate it. So relax and have a slice of pizza.

Jason Bailey

[A couple of nights ago my wife and I and our friend Chien Mingchi went to see the film *Raise the Red Lantern*, about a Chinese girl who becomes the concubine of a rich man in China in the twenties. After the film, I suddenly thought, "How come there aren't any male concubines? In fact, how come there's no word for a male concubine?" And then I thought: "There is such a word in Esperanto: konkubo!" And then I thought that Esperanto has masculine equivalents of "Miss" (fraŭlo), and "nurse" (flegisto), and "prostitute" (prostituito)... In fact, when you think about it the -IN- suffix is not a symptom of sexism, but a counter-

weight to it, since it makes all roles equally accessible to men and women alike! Yes, there are sexist words in Esperanto, but they turn out to be precisely those individual feminine neologisms that have been imported into Esperanto over the years by individuals unsatisfied with the use of -IN-, in order to define particular roles as unequivocally female (amazono, meretrico, primadono—are there, then, no male prima donnas?)]

Daŭrigo de paĝo 9

specialiĝo ĉar ne ekzistas sufiĉe da trijaraj kaj kvarjaraj kursoj traktantaj pri postgramatikaj lernemoj kiel literaturaj, historiaj kaj kulturaj movadoj, ekzemple, laŭ la modelo de nacilingvaj kursaroj jam delonge enestigataj en universitatajn lingvoprogramojn. Universitatnivela lingvoprogramo haviganta al siaj studentoj fakan specialiĝon devas proponi al kandidatoj plenan kvarjaran kursaron kies lernemoj disvastiĝas inter lingvaj, literaturaj, historiaj, politikaj kaj kulturaj kampoj. Tian programaron usona Esperanto-movado ne havas. Tian programaron, tamen, usona Esperantomovado kapablas havi, laŭ mi, sed mi ne havas ĉi-tiean sufiĉon da spaco por priskribi ĝin. Aliloke, en alia artikolo, je alia momento, mi povos fari tion.

4. Malpermesas eniron de Esperanto en universitatfremdlingvan lernoprogramaron profesoroj de tradiciaj naciaj lingvoj kies ĵaluzo aŭ timo aŭ malkono pri Esperanto igas ilin fortaĵi malamikoj. Ni bezonas strategion por forigi tiun malamikecon, por ke, kiam ni finfine estos kunigintaj valoran tradicifidelan nacilingvosimilan kvarjaran Esperanto-kursaron, ili estos pretaj ricevi ĝin kaj nin inter si kiel plenrajthavantajn kunlaborantojn.

Daŭrigo de paĝo 4

Daley, proklamis la semajnon de la 23a-29a de februaro la Semajno de Internacia Amikeco. Urbestro Daley citis i.a. la laborojn de la Universala Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Societo de Chicago, kaj la novan Esperanto-kurson en Alcott Elementary School. **Esperanto Society of Chicago, 5048 N. Marine Dr. #D-6, Chicago IL 60649, tel. (312) 271-8673**

MARYLAND

Invitite de samideano Lee Stern, Martha Flores de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono vizitis, la 8an de januaro, kvakeran komunumon por emerituloj en Sandy Springs por prezenti vidbendon kaj por paroli pri la Universala Kongreso en Bergen en Julio 1991. Post bongustega vegetarana vespermanĝo, kiu inkluzivis kelkajn legomojn kultivitajn en la komunuma legomĝardeno, oni renkontis la proksimume 40 partoprenantojn de la forumo. Eĉ se la parolado temis ĉefe pri Norvegio kaj pri tio, kion s-anino Flores lernis per Esperanto, ĉiu demando de la aŭskultantaro temis pri Esperanto. Ŝajnis ke estis kelkaj antaŭaj esperantistoj kiuj faris tre bonajn, bazajn demandojn pri Esperanto por ke la ceteraj informiĝu. Aliaj demandoj estis: "Ĉu ekzistas Esperanta kulturo? Literaturo? Kio pri lerneja instruado?" kaj aserto: "Domaĝe ke Esperanto ne venkis!" Respondis s-anino Flores: "Ni parolas kaj ĝuas ĝin." (el *La Potomaka Esperantisto*, februaro 1992)

MASSACHUSETTS

Pro pliampleksigo de sia agado, la Esperanto-Societo de Nov-Anglio starigis kvar novajn funkciojn, kiuj estas: bibliotekisto; arkivisto; publicisto; kaj vendestro (de libroj). S-ano John Devlin jam proponis sin kiel bibliotekiston. (laŭ Verda Lumo, marto 1992) **Esperanto Society of New England, P.O. Box 655, Concord MA 01742, tel. (508) 264-4349.**

NEW YORK

Je la tria vendredo de novembro la Esperanto-Societo de Novjorko okazigis Malfermitan Domon. Ĉeestis 39 personoj, el kiuj preskaŭ la duono estis gastoj. Paroladis i.a. la Prezidanto Thomas Eccardt kaj Profesoro William Orr de Hofstra Universitato. Oni ankaŭ rigardis la vidbendon *The World of Espe-*

ranto. (raportis Lydia Tabor en *Novjorka Prismo*, januaro 1992)

La 13an de decembro 1991 okazis la jara Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado kun la temo Language and International Education: A Review of Priorities, organizite de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj la traduka fako de Unuiĝintaj Nacioj. Inter la prelegantoj estis du esperantistoj: Humphrey Tonkin (Language and International Education: Some Radical Solutions); kaj Ronald Glossop (How to Integrate Language Study and Global Education). Tuj poste okazis la Zamenhofa festo de la Esperanto-Societo de Novjorko. La festenon vidbendigis s-ino Ŝijimin. Humphrey Tonkin parolis pri Esperanto kaj prezentis la Zamenhofan Premion al Sir Brian Urquhart, emeritiĝanta Subsekretario Ĝenerala por Politikaj kaj Asembleaj Aferoj de UNO. (raportis Rochelle F. Grossman kaj Thomas Eccardt en *Novjorka Prismo*, januaro 1992)

Kvankam ni ankoraŭ ne ricevis oficialan informon pri tio, pro neoficiala telefona diskuto kun eldoneja funkciulo ni povas supozi, ke post nelonge aperos anglalingva traduko de la libro *Esperanto* de Pierre Janton ĉe novjorka universitata eldonejo. **Esperanto Society of New York, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017, (212) 687-7041**

TEXAS

En la regiono de la Esperantistaro de malsupra Valo Rio Grande la ĉijaran komencgradan kurson instruas longtempa esperantisto Louis Tutt en la Mercedes biblioteko. La kurso, komenciĝinta en novembro, estas instruata je sabatoj matene, kaj allogis plurajn mezlernejajn studentojn kaj plenkreskulojn, enklude kelkajn el apudaj urboj. (informo de Prenda E. Cook)

S-ro Louis Tutt, kun la Mercedes bibliotekisto kaj du Esperanto-lernantoj, aperis en trikolumna frontpaĝa foto sur *The Mercedes Enterprise* en januaro. La kuna artikolo informis pri la akcepto de pluraj Esperanto-libroj en la Mercedes biblioteko pro la bonvolo de D-ro David Keedy de San Antonio, kaj informis pri la horoj de la Esperanto-kurso. (informis Prenda E. Cook)

Por festi la datrevenon de Zamenhof, esperantistoj el Mercedes, Pharr, Edinburg kaj La Feria grupiĝis kun la

Harlingenanoj por decembra festeno. Armin Doneis de Pharr, iama ĉefdelegito de UEA, faris informoplenan paroladon pri ELNA, UEA kaj Esperanto. Oni montris la Bergenan informfilmon, kune kun memorajoj de la UK en Norvegio, Ĉiu partoprenis en Esperantaj skeĉoj kaj ludoj. (informis Prenda E. Cook) **Rio Grande Valley Esperantistaro, Box 7167, Harlingen TX 78550**

BAHAANOJ

S-inoj Candice Bowers kaj Roan Orloff Stone ĉeestis la semajnfanan lernejon bahaan en Bridgeport, TX, la 27an-30an de decembro, kie, je peto de junularo nombranta 45, ili prezentis prelegojn pri la bahaa religio kaj pri Esperanto sabaton vespere. Preskaŭ ĉiuj poste venis al ili kaj petis informon pri lernado de Esperanto, adresojn, ktp. Kaj ĝis la fino de la lernejo, konstante venis al ili gejunuloj por peti plian informon. Dimanĉe la plenkreskuloj, aŭdinte pri la junulara vespero, petis al s-ino Stone rakonti pri siaj travivaĵoj en la bahaa religio kaj en Esperanto. La direktorino de la lernejo poste parolis kun s-ino Stone kaj volis aranĝi lokon por ŝi en la programo de la proksima lernejo. (raportis Roan O. Stone)

Daŭrigo de paĝo 8

[*She didn't say what she said.*]

An anti-France campaign raged last summer in Japan as a result of French Premier Mrs. Edith Cresson's statements about the Japanese people.

After a 40-minute discussion with the Premier, a delegation from the Japanese parliament commented that the statements had been distorted by the Japanese press because of a translation error. According to them, Cresson never labelled the Japanese "enemies," only "opponents."

[*Reported in Heroldo de Esperanto, Nov. 25, 1991.*]

[*...nor what she wore.*]

"T-shirts with inscriptions on them may be in vogue these days," notes *India Today*. But one young lady in Calcutta found out that trying to be fashionable in this way can have serious drawbacks. As she strolled along, "dressed in trendy

Daŭrigo sur paĝo 13

ESPERANTO ON-LINE

HOW TO PRINT THE Ĵ USING WORD PERFECT 5.1 AND AN HP LASERJET SERIES II

by John Dale

I had been having a problem with printing the Esperanto small j circumflex (ĵ) on WordPerfect 5.1 using a Packard Bell printer which emulates the HP Laserjet Series II. Although the Word Perfect International Character Set #1 provided this character at position 1,141, and although the capital J circumflex (Ĵ) and other Esperanto supersigned letters printed perfectly, the small j apparently was not carried in the Roman 8 or other symbol sets provided by my HP Laserjet Series II clone printer. For this reason, it would be printed by Word Perfect using a graphics mode. As a result, it came out looking strange. [The character shown by Mr. Dale is not reproducible with any of the editor's Macintosh fonts, but presumably those for whom this article is written will be familiar with it; it looks like a ĵ, but is about one dot thick —editor] On the editing screen, however, everything looked fine.

As a result of several calls and some experimentation, I discovered a cheap solution to the printing problem. It involves using both the Overstrike and the Compose functions of Word Perfect. There are other solutions, like buying a software package such as Q Font whereby you can create your own fonts and letters, but these things can cost \$80 or more. Samideano Jim Deer did this and has excellent results. However, I didn't have \$80.

I have solved the printing problem; however, on the screen the created character will look like an ordinary j, whereas on the screen IC 1,141 looks like it should, namely like an Esperanto ĵ. If, however, during the Overstrike sequence, one puts the j first and the ^ second, the screen will show only the ^, which will allow one to know that it's really a ĵ.

Here, then, is my solution: Instead of

using simply the Compose function and invoking the international character at position 1,141, use the Overstrike and Compose functions together using the circumflex character located at 1,3 and the dotless j symbol located at 1,25. Do not use the circumflex character generated by the Shift-6 character (^) provided on the keyboard.

To generate the ^ screen appearance which will print as a ĵ, the exact sequence of keystrokes is Shift-F8/4/5/1/Control-2/ 1/ comma/ 25/ enter/ control-2/ 1/ comma/ 3/ enter/ enter/ enter/ enter. To embed this in a macro assigned to Alt-j, simply follow the instructions for creating macros starting with Control F-10. Hopefully your result will print out as a beautiful ĵ.

Maybe if enough people write to Hewlett Packard or to Word Perfect and ask them to provide an Esperanto software kit or cartridge, mentioning that China broadcast nationwide televised lessons in Esperanto for eight months four times per week, "the market" will get the message. Or maybe an enterprising Esperantist will market a better solution. WP's CEO is Mr. Allan Ashton, Pres., Word Perfect Corporation, 1555 N. Technology Way, Orem UT 84057. HP's CEO is John Young, President, Hewlett Packard Corporation, 3000 Hanover St., Palo Alto CA 94304.

AN INTRODUCTION TO THE NET

by David Wolff

The Internet mailing list mail.esperanto contains about 70 individual entries. Whenever someone sends mail to "esperanto@rand.org", that mail is forwarded to everyone on the list. People on other networks that can receive Internet mail (e.g. on CompuServe or FidoNet) can subscribe to the mailing list. (To subscribe, send a request to "esperanto-request@rand.org". Useful for people who have e-mail, either at work or from a service.)

The newsgroup "soc.culture.esperanto" is distributed on many Internet and USENET sites and has a readership of several hundred. Every message sent to the mail.esperanto list is forwarded to soc.culture.esperanto, and every article from soc.culture.esperanto is normally forwarded to the mailing list. Thus, if you are reading the newsgroup, you do not need to be on the mailing list. However, note that the newsgroup is theoretically an "Internet-only" group, and that many messages, including all those forwarded from the mailing list, are tagged with a "Distribution: incl" header line, and may not be distributed to every site. (No subscription necessary; ask your system administrator about "UseNet newsgroups".)

ESPER-L@TREARN is a BITNET-based mailing list; every message sent to soc.culture.esperanto is forwarded to ESPER-L, but not the reverse. (Eldad Salzman of Israel, who manages ESPER-L, is attempting to have this changed. -DH)

CompuServe Information Service (CIS) has an Esperanto board in its Foreign Languages Education Forum; CIS subscribers can type /GO FLEFO for further information.

Daŭrigo de paĝo 12

baggy trousers and an eye-catching T-shirt," she noticed some Chinese boys pointing at her and laughing hysterically. She questioned them and was told that the inscription on her T-shirt was a message in Chinese that read: "I am a bald coconut-head baboon. And anyone who can read this should make fun of me as I am the greatest fool to have displayed an inscription in a language which I am unable to either read or write."

[Reported in La Brita Esperantisto, Jan.-Feb. 1992.]

[An unbelievable disclosure!]

On December 12, 1986, a Soviet aircraft crashed in Berlin, killing 72 people. Only now, according to a report in the German magazine *Stern*, has a secret report been found that explains the reason: the Soviet aviators did not know a single word of English, the international language of aviation.

[Reported in *Monato*, Dec. 1991.]



RECENZE

Tavanti, Corrado, & Ertl, István: *Tiu toskana septembro*. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1990. 137 p. Ĉe ELNA: Kodo TIU001, prezo \$13.95 (nemembroj) / \$13.25 (membroj).

La krimromano en Esperanto furoras inter iuj el la legantaro. Por aliaj, tiuspeca verko estas malestimata, konsiderata malserioza aŭ malintelekta. Al tiuj, preferendas studi aŭ nefikciaĵojn aŭ pli profundajn romanojn, aŭ almenaŭ verkojn kun interesa, analizinda stil-strukturo. (Mi mem ĝenerale troviĝas en ĉi dua grupo, ne pro malestimo, sed pro tialo, ke mi kutime ne igas trovi tempon legi esperantaĵojn pure distrajn.)

La jena *Tiu toskana septembro* kapablas kontentigi homojn de ambaŭ grupoj. La intrigo: Junulinon oni trovas murdita en parko. Kiu ĝin faris? Juĝisto Lamberti kaj la kunlaborantoj devas tion diveni, taksante sufiĉe grandan aron da suspektatoj, kiuj aperigadas sin diversloke kaj -foje tra la rakonto. Finfine okazas solvo, kiun mi kompreneble ne rajtas riveli ĉi tie. Ŝajnas, ke troviĝas sufiĉa kvanto da aludetoj, kiujn onidire estas neproĝo en bona krimromano por ne tro skui la nervojn de la leganto ĉe la fino.

Plendeton mi povas fari pri la multeco de rolantoj. Iom malfacile estas memori, kiu estas kiu inter la homoj, kiuj reaparadas aŭ remenciatas. Estus utile havi liston aŭ eble mem listigi ĉiun je la unua apero, por posta rekono.

Kaj la lingvaĵo? Bonegaj ekzemploj por regali kaj la skemistojn kaj la naturalistojn (aŭ, se vi preferas, la *elinternistojn* kaj la *eleksteristojn*):

p. 7 ...certaj uloj frekventas la lokon por necesumi.

p. 19 ...antaŭ ol eki private li laboris ĉe la firmao AESA...

p. 19 —...kiam ni fine foriros, ni nepre tuj kafumu ĉe l' Akademio, aliel mi ne plu eltenas en tiu ĉi fetoro.

p. 20 —Mi tute ne fakas pri tio.

p. 20 ... malsidiĝinte, li ekpromenis en la ĉambro kun zorgoplana mieno.

p. 26 La knabino jam sekviŝis al si la okulojn.

p. 27 ... por aĉeti botelon da ruĝa.

p. 20 ... ŝi devis havi pli ol kvindek jarojn postdorse.

p. 32 —...ĉiu profetas por propra

profito...

p. 35 La parkoj ruĝis kaj okris festfajraĵe pro la folioj morditaj de aŭtuno.

p. 42 ... ankaŭ "duraj drogoj" ekaperadas de nelongo.

p. 46 ...tiu homo jam spertis multajn suprojn kaj subojn...

p. 62 La gepatroj vivtenis sin pene kaj sene...

p. 63 ... kaduka domo kun tavole deiganta stuko.

p. 64 —...mortu vi, por ke fortu mi.

p. 72 Antaŭe ŝi sambenkis kun knabino...

p. 74 Ekstere, sur la placo aŭdigis sin tenoro erarinte vivkarieron.

p. 76 —...ŝin mi tamen ne plu povas demandi prie.

p. 87 —Leonardo estas ĉee, lin demandu.

p. 90 La voĉo de la ĝardenisto ŝajnis tone iel agresive.

p. 117 —Kiel pozis Mantovani ... ĉu ŝi ne ŝajnis amorunta?

p. 127 Ne restis alio ol atendi, ĝis...

Kaj diversloke troviĝas varioj priskribi la saman aferon:

p. 42 Li fingris la numeron de la Oficejo.

p. 81 Li elturnis la numeron de la Klinikio...

p. 48 ...la telefono ekŝrikis.

p. 120 ... ektrilis la telefono.

Ŝajnas, ke senĝene la verkintoj utiligis diversajn rimedojn de Esperanta esprimo, agnoskante la avantaĝojn sen troa konsidero de iu aŭ alia ortodokseco. Ne estas klare, ĝuste kiu kontribuis kion. Sed mi aŭdis, ke Tavanti la unua verkis la romanon kaj poste petis al Ertl ĝin poluri. Do, pri la detaloj de verkado, jen sufiĉe modesta, malegoisma sinteno.

La verkon oni povas ĝui kabinete aŭ brakseĝe, aŭ kiel analizindaĵo en kurso aŭ studgrupo. Ĝi servu kiel modelo por eventuala estonta verkado aŭ eĉ por ordinara konversacio.

Reginald Jaderstrom

MacGill, Stefan: *Tendaraj tagoj: Kajero unu*. Budapeŝto: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1991. 42 p. Ĉe ELNA: Kodo TEN001, prezo \$7.50 (nemembroj) / \$7.10 (membroj).

Jen "situaci-komunika lernolibro ... destinita unuavice por lernantoj inter 10-

kaj 14-jaraj." La libro prezentiĝas kun multegaj dialogoj kaj bildoj, laŭ la stilo trovata en la revuo *Juna Amiko*, kiun la verkinto ankaŭ redaktas.

Partoprenintoj en la 1990-kursaro en Sanfranciska Ŝtata Universitato rememoros tiun Stefan MacGill kiel unu el la instruistoj. Tiuj, kiuj ne mem partoprenis la kursaron sed ĉeestis la kromajn piknikojn eble rememoros lin kiel vigan aktoron, kiu utiligis diversajn kapablojn de voĉo kaj korpo en monologo.

La temo trairanta la proks. 30 lecionetojn estas tenaraj travivaĵoj de divers-etnaj gejunuloj. La plejparto de la situacioj estas amuzaj kaj paroligaj, sed oni lernas ankaŭ multon pri geografio kaj kulturo. (Interalie: Habibo loĝas en Kairo, kies telefona landokodo estas 20, kaj urbokodo 2. La lingvo-regionoj de Svislando estas germana 65%, franca 18%, itala 12%, romanĉa 1%. En iuj landoj policano rajtas postuli monpunon tujankaj surlokan.)

Krom la situaci-dialogoj laŭtlegendaj aŭ improvizendaj, la ekzercoj inkluzivas sintaksajn aŭ vortajn anstataŭigojn, frazkompletigojn, respondojn al demandoj, desegnadon de bildoj por frazoj, ktp. Troviĝas ankaŭ paĝo de bonaj prononckontrastaj ekzercoj. La verkinto konsilas, ke instruisto rajtas iel ajn modifi la enhavon laŭ la bezonoj de la uzantoj.

Eĉ spertaj esperantistoj povas renkonti terminojn antaŭe nekonatajn aŭ jam forgesitajn: *funikularo*, *parabola anteno*.

Iu ĝeno kelkloke aperas: Meze de p. 5 aperas kvarfoje "kiu ankaŭ", sed sube troviĝas la nuntempe pli akceptata "ankaŭ kiu". Sur p. 18 aperas "Mi ankaŭ!" dufoje. Sed supre de p. 29 la deklaro estas, ke *ankaŭ* "staras antaŭ la vorto, al kiu ĝi rilatas."

Kial tiu kontraŭdiro, mi ne scias. En mia nuna stadio de esperantistado, "Mi ankaŭ" agacas la lingvosenton. Sed la libro invitas ampleksigojn kaj modifojn, kaj eventualaj instruistoj povus (aŭ devus) proponi laŭregulan uzon de la preferata formo. Kaj samtempe estus utile sciigi al la lernantoj, ke al poloj kaj hungaroj (kiel ankaŭ al anglalingvuloj) tiu neaprobata sintakso estas natura en la propraj hejmaj lingvoj.

Iam aperos du aliaj kajeroj en la kompleto, kaj ŝajne ankaŭ tiuj uzindos por infanoj en aŭ ĉirkaŭ tiu aĝrango. Talenta instruisto povas bone utiligi ilin diversmaniere. Kaj praktikado je tia metodo eventuale povas talentuligi aliajn. Mi faris kelkajn provojn kun la propra filino (tiom-aĝa) kaj trovis la rezulton kontentiga.

Reginald Jaderstrom



VOLAS KORESPONDI

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

BULGARIO

Aniška PETROVA, ul. Otec Paisij 9, BG-8000 BURGAS. 26-jara stevardino kaj ekskursistino, interesiĝas pri libroj, muziko, teatro, maro, kun amikoj kiuj estas gajaj kaj interesaj.
A. ANGELOV, ul. Trepetlika No. 12 "B", BG-1407 SOFIA. Viro, interesiĝas pri politiko, volas interŝanĝi I.P.K.

ĈEĤOSLOVAKIO

LIŠKA Jaroslav, Sidlište svobody 4/9, 796 01 PROSTEJOV. 30-jara fraŭlo, ŝatas naturon, multe vojaĝas, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn de urboj.
TECHNIKOVÁ Eva, Smetanova 468, 46841 TANVALD/ Sumburk. 37-jara virino, ŝatas desegni, naturon, fremdajn lingvojn, ĉion bonan kaj belan.
Petr HAJNY, sídl. 571, 394 64 POČATKY. 42-jara instruisto, pri laboro kaj vivo.
Jan LAPUNIK, Na jilech 2651, 47006 ČESKÁ LIPA. Kolektas kungluajn modelojn aeroplanajn el plastmaterialo, bildkartojn kaj bierajn etiketojn.
Lubos MIKULČIK, Dlouhá 2551, 47001 CESKA LIPA. Kolektas miniaturnajn modelojn de aŭtomobiloj.

ĈINIO

QIU Jinping, Gezhouba 3-a Hospitalo No 2-3-203, CN-443002 YICHANG, Hubei. 32-jara elektristo-teknikisto, interesiĝas pri diversnaciaj kulturo, arto, historio, fason-vesto, arta fotado, filmo, ĉiutaga vivo, E-movado, kolektas E-filatelaĵojn, monojn, artaĵojn.
WEI Da, 29 Zhongxue Dehui, CN-130300 JILIN. 40-jara instruisto de mezlernejo, fraŭlo, alteco 1,70 metroj, serĉas amikinon cele edziĝon, pri ĉina lingvo, sporto, muziko, aliaj.

Amikeco trans limoj

EBURBORDO (COTE D'IVOIRE)
KOUAME Douglas, s/c Kouadjo Akane a la CIE, 01 BP 6923 ABIDJAN 01.

KAMPUĈIO

NAM Vutha, Faculté d'Architecture et d'urbanisme de l'U.B.A., PNOM PENH. 20-jara studento.
SO Vithyea, House No. 16 BE, Street No. 242 Cenkat Chaktomok, Khanh Donpenh, PNOM PENH. 20-jara studento.
KÁNG Channa, Banque National du Cambodge, PNOM PENH. 26-jara oficisto de banko.

KROATIO

Marija BELOŠEVIC, Miškinina 130, CRO-41000 ZAGREB. Klaso de 9-17-jaruloj, kun usonaj samaĝuloj.

KUBO

Alvaro Raúl VALDÉS, La Caoba, Yanacas, VILLA CLARA 54510. 26-jara arbara teknikisto, ŝatas sporton, naturon, vojaĝojn, legi librojn, vidi filmojn, aŭskulti muzikon.

NEPALO

Bhagvan PRADHAN, 1-560 Kalikasthan, Dilli Bazar, KATHMANDU. 21-jara viro.
Kabindra Raj SHAKYA, P.O. Box 282, KATHMANDU.

POLLANDO

Wladyslaw JAKUBOWSKI, Nowa Wioska 18, 62-641 OLSZOWKA. 26-jara viro, interesiĝas pri literaturo, muziko, Esperanto.
Jerzy WROBLEWSKI, 21-305 SUCHOWOLA. 42-jara inĝeniero, interesiĝas pri ĉasado, lingvistiko, folkloro, ĉiutaga vivo, kolektas esperantaĵojn, bildkartojn kaj ĉasadajn trofeojn.
Tadeusz GRUDNIEWSKI, ul. Sambora 2, PL 83-130 PELPLIN. 43-jara magistro pri pedagogio, laboras en elementa lernejo, interesiĝas pri politiko, historio, teatro, muziko, turismo.

RUSIO


KARASUK Natalia, 646204 ZUZINO, Omsk reg., Majorova ul. 27-77. 15-jara lernantino, ŝatas aŭskulti muzikon, desegni, legi, vojaĝi, revas havi hundon kaj veturi eksterlanden.
Elena DUJDOVA, str. Vavilova 35-17, 660025 KRASNOJARSK. 17-jara lernantino, kun 17-18-jaraj geesperantistoj, kolektas monerojn, bildkartojn, poŝtmarkojn, kalendarojn, bildojn pri bestoj.
Olga GOVORINA, str. Vavilova 33-38, 660025 KRASNOJARSK. 17-jara lernantino, kun 17-18-jaraj geesperantistoj, pri sporto, futbalo, hokeo, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, bildojn pri bestoj, glumarkojn.
Maria LUĀANINOVA, str. Semafor-naja 353-8, 660025 KRASNOJARSK. 17-jara lernantino, kun 17-18-jaraj geesperantistoj, pri vivo en Usono, kolektas bildojn pri bestoj, muzikajn kasedojn, poŝtmarkojn, bildkartojn, revuojn, glumarkojn.
Olga RATKEVIĈ, str. Vavilova 31-17, 660025 KRASNOJARSK. 17-jara lernantino, kun 17-18-jaraj geesperantistoj, ŝatas desegni, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, bildojn pri bestoj, kalendarojn.
Maria ZELENJAVA, str. Semafor-naja 379-8, 660025 KRASNOJARSK. 17-jara lernantino, kun 17-18-jaraj geesperantistoj, kolektas monerojn, bildkartojn, poŝtmarkojn, kalendarojn, bildojn pri bestoj.
Anatolo SIDOROV, 167031 SYKTYVKAR, Komi SSR, Str. Nevelskaja 53-6. 29-jara fabriklaboristo, pri la arkeologio, historio, etnografio kaj kulturo de nordamerikaj indianoj.

UKRAINIO

Sergei GRIŠĈENKO, P.O. Box 6687, 330123 ZAPOROĴJE. 20-jara viro, blondhara kaj bluokula, interesiĝas pri politiko, kinofilmoj, lingvoj, literaturo, kolektas librojn, bildrevuojn, poŝt-kartojn, mapojn, sondiskojn.

ZAIRIO

MAYOMA-DIANKEMBO, B.P. 152, KINSHASA 7. 31-jara viro, verkas kaj kantas en Esperanto, volas esti en rilato kun fraŭlino, katolika, kuracistino aŭ flegistino.



VOJAĜU ESPERANTE EN 1992

San Francisco State University
29 June - 17 July
23rd annual 3-week seminar
6 different classes
International faculty and students
University of Hartford
13-18 July
2nd annual Summer Workshop
John Wells, Duncan Charters
ELNA Convention
July 17-23
Berkeley, California

The kongresejo is the University of California, Berkeley—one of the most interesting campuses in the U.S. There is plenty to see on the east side of the bay. Oakland's Museum is the best of its kind in the country; the university museums are great; and sightseeing here is a treat.

The price is right, the location attractive, and local Esperantists are eager to host samideanoj from around the world.

Kongresu en Berkeley!

Universala Kongreso de Esperanto July 25-August 1 Vienna, Aŭstrio

The 77th UK takes place in a time of great and fundamental change in all of central Europe, and due to Vienna's central location, will attract a great many Esperantists from
Estimated attendance is 3,000.

Post-kongresa Ekskurso August 1-10

Hungary & Czechoslovakia

Visit beautiful Bratislava, Budapest, Tatra Mountain area, Tabor and PRAGUE. A great trip, visiting Esperantists along the way. Only 2 spaces still available.

5a Pacifika Konferenco

August 17-22
Qingdao, Ĉinio



NI APLAŬDU QINGDAO!

VOJAĜU AL ĈINIO!

Qingdao is a beautiful city located on the China coast approximately between Beijing and Shanghai. It is an international scientific and trade center with much to recommend it to the tourist. In addition it is a center of Esperanto activity and instruction. Esperanto has even been listed as a compulsory course at the Qingdao Tourism Center.

The Pacifika Konferenco will be a real cultural feast as was the UK in Beijing! In addition to an outstanding program, a number of pre- and post-congress excursions are being offered, including a cruise on the Yangtze River and a trip to exotic Tibet. Less extensive and more inexpensive excursions are also offered.

A shared double in the Huanghai Hotel (the kongresejo), all meals and excursions during the conference (6 days, 5 nights) is only \$475. Transportation to and from Qingdao from the West Coast is \$1500, slightly higher from the East Coast.

Esperanto Vojaĝ-Servo is the official peranto for the Pacifika Konferenco and can provide you with aliĝiloj and information on the various excursions and best airfares.

At this time, only 2 Americans have planned to attend. We need several more if this is to be a Tut-pacifika Konferenco. We hope you will be able to go. It will be a real treat for those of us who do!

ESPERANTO VOJAĜ-SERVO

6104 La Salle Ave.
Oakland, CA 94611
(415) 339-2001
10am-6pm M-F

USE YOUR ESPERANTO TRAVEL

**SERVICE FOR ALL YOUR
ESPERANTO TRAVELS!**

ELNA

President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1994)
Other Board Members: Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994)
Commissioners: Don Coleman (Local Clubs), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), David Gaines (Youth), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course)
Director, Central Office: Mike Donohoo
Vice-Director, Central Office: Ionel Onet
ELNA Archivist: Ionel Onet

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1992

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1992

Member-Guidebook only (MG)	\$ 8.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$18.00
Member-Subscriber (MA)	\$45.00
Societo Zamenhof (additional)	\$90.00
Subscription only to Esperanto	\$27.00
Subscription only to Kontakto	\$14.00
Life Membership in UEA	\$1125.00

Send payments for UEA memberships or sub-

scriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO

BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE

1992(5) of *Esperanto U.S.A.* is July 25, 1992

Esperanto U.S.A.
Volume 28, No. 3
ISSN 1056-0297

Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
Info only: (800) 525-8944
Editor: Don Harlow
Telephone: (510) 222-0187
CompuServe: [72627,2647]
Internet: 72627.2647@compuserve.com